

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 31-an de aŭgusto 2017 per Skype.

(Aprobata la 21an de septembro 2017)

Partoprenis:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os (ĝis punkto 7)
Heming W Thorbjørnsen en Haugesund
Lars Sandbakk en Sandnes
Jardar E Abrahamsen en Trondheim (dum punkto 1 kaj ekde punkto 6)

0. Tagordo

Aprobata.

1. Sinprezento de novaj estraranoj

Ĉiuj ĉeestantoj mallonge prezentis sin.

2. Ekonomio

Tiun punkton ni devis prokrastigi pro foresto de la kasisto.

3. Landa Kunveno 2017 en junio

La Estraro dankas al la lokaj kluboj pro sukcesa kaj bone aranĝita kongreso. La protokolo dume ne pretas.

4. Farendaĵoj post la Landa Kunveno

Necesas verki protokolon kaj aperigi ĝin en la membrogazeto.

La aprobitan laborplanon kun ŝanĝoj oni ankaŭ prezentu.

Indas afiŝi la jarraportojn, la planojn, kaj la novan estraron en nia retejo.

5. Skandinava Kongreso 2018

Mario Machlik rakontis ke post la unua Skandinava Kongreso, en 1918, oni decidis ripeti la aferon 100 jarojn poste. Do oni nun planas ŝipvojaĝon inter Kopenhago kaj Oslo tien-reen-tien en la mezo de majo 2018, kun surmara kongreso sur ŝipo de Pearl Seaways kun kunvenoj de landaj E-organizoj, komunaj diskutoj kaj manĝoj, ekskursoj en Oslo kaj Kopenhago, kaj ĝenerala interkonatiĝo. Estus bone se ankaŭ okazus komuna kunveno por ĉiuj partoprenantaj organizoj.

Por plani la ekskurson en Oslo estus bone havi helpon de la E-klubo en Oslo. La prezidanto kontaktis la klubon pri tio, kaj li ankaŭ mem pretas ĉiĉeroni iomete.

6. Planoj por la aŭtuno

La estraro diskutis uzi Facebook por reklamado kaj varbado. Per ĝi ni povus atingi multe pli da homoj ol per standoj surstrataj. Ne necesas afiŝadi tie dokumentojn. Sufiĉus skribi unu-du liniojn du-tri fojojn tage en Facebook, kaj foje montri bildojn, por vivteni la intereson de la publiko. En Facebook-*paĝo* por informi kaj reklami al la ĝenerala publiko, kaj en Facebook-*grupo* por reklami al sia reto de konatuloj kaj al ĉiuj, kiuj iom interesiĝas pri Esperanto. Heming W Thorbjørnsen volontulis por pretigi tian paĝon aŭ/kaj grupon. Kiel komenco, ni petu la membrojn de *nel-inform* pri taŭgaj kaj bonaj fotoj kiujn ni rajtas uzi por allogi homojn.

7. Datoj por estraraj interkonsiliĝoj aŭtune

21/9, 26/10, 30/11

8. Sekureco de nia retejo

Bezonatas kriptigi nian retejon. Pro tio ni devas aĉeti SSL-atestilon. Ni decidis peti Judith trovi la plej bonan kaj malmultekostan solvon por ni kaj mendi ĝin de la liveranto. La kasisto pagos la elspezojn pri tio. Ni petas repagon de NJE por la kosto de ilia subdomajno.

9. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 21.35h.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 21/9.

Raportis Ulf Lunde (ĝis punkto 7) kaj Mario Machlik (ekde punkto 7)